


ĜENERALA KONGRESRAPORTO DE LA 11a MEKSIKA ESPERANTO-KONGRESO, OKAZINTA INTER LA 15a KAJ 18a DE SEPTEMBRO EN COBEH IN, GUADALAJARA JALISCO¹

Jaŭde, je la 15a de septembro

Kiel informite en la kongresprogramo, la unua kongresa tago komenciĝis per la okazigo de ekzamenoj por atesti konojn pri Esperanto kadre de ILEI-UEA. Entute partoprenis kvin personoj; kvar je la nivelo “baza” kaj unu je “meza”. Tiuj niveloj kongruas al B2 kaj C1 de la KER-ekzamenoj respektive. Vespere, ekde la 4a horo, ankaŭ komencis alveni kelkaj homoj al la kongresejo por registriĝi, ricevi la kongresmaterialon kaj profiti la vesperon salutante kaj parolante kun aliaj partoprenantoj. Dum tiu tago ni profitis malfermi la libroservon kaj montri al unuaj alvenintoj diversajn librojn kaj materialon en kaj pri Esperanto.



Vendrede, je la 16a de septembro

Je la 9a horo, komenciĝis la akcepto de kongrespartoprenantoj. Ĝoje kaj feliĉe pro renkonti novajn kaj malnovajn geamikojn, la samideanoj venis de diversaj partoj de la lando. Ĉefe de la grandaj centraj urboj tamen ankaŭ de aliaj foraj sed same gravaj por la movado. Indas mencii la partoprenon de elstaraj esperantistoj eksterlandaj kiel Duncan Charters el Anglujo, loĝanta en Usono, Georgo Handzlik el Pollando kaj Jean-Marc Leclercq (ankaŭ konata kiel JoMo) el Francujo.

Samtempe kun akceptado ekfunkciis libroservo. Tie oni ofertis diversajn librojn, romanojn, kursojn, vortarojn, memoraĵojn, ludojn, kaj tiel plu, dum la tuta kongreso.

Je la deka horo komenciĝis la solena malfermo (Foto 1) de la 11a Meksika Esperanto



Foto 1. Malfermo de la 11a MEK. De maldekstre: Ulises Franco, Daniel Moreno, Mallely Martínez, Martin Schäffer, Duncan Charters kaj David López.

Kongreso, kies ĉefa temo estis “La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj”. Ni aŭskultis la vortojn de Mallely Martínez, prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio, kiu bonvenigis kaj kuraĝigis la partoprenantojn, speciale tiujn, kiuj neniam partoprenis kongreson, profiti tiun ĉi sperton por babili kun la aliaj kaj lerni pli de

¹ La dokumenton verkis la sekvaj estraranoj de Meksika Esperanto Federacio; Mallely Martínez Mateos, prezidantino, Daniel Moreno Martínez, ĝenerala sekretario, David López Rueda, membro. Ankaŭ partoprenis en la verkado Martin Schäffer. La fotoj estis faritaj de Mallely Martínez Mateos kaj Edith Ibaráz Quezada.

la esperantaj instruado, movado kaj kulturo. Ni ankaŭ aŭskultis la bonvenigajn vortojn de la MEF-estraranoj Daniel Moreno kaj David López, de Ulises Franco, LKK-ano, Duncan Charters, vic-prezidanto de ILEI, Martin Schäffer, helpanto de MEF kaj kunorganizanto de la kongreso. Tuj post la inaŭguro, ni aŭdis la “Espero” ludata de la profesiaj fagotistoj Armando Hernández kaj Ana Lilia Díaz.

La kongresprogramo sekvis per prelegoj de David López, kiu prezentis «La propedeŭtika valoro de esperanto», grava temo por informi la eksteran publikon pri la lingvo kaj interesigi la homojn pri la temo. Aliloke Daniel Moreno prelegis pri « Instruado de Esperanto en Meksiko » kie li parolis pri diversaj problemoj trovataj kiam oni provas organizi kursojn kaj la problemoj ekaperantaj en kursoj kaj kluboj funkciaj. Parolante pri la argumentoj pro-Esperanto, kiun oni kutime aŭdas, samideano Georgo Handzlik diris « Kiam mi vojaĝas eksterlanden mi ŝatas viziti homojn, ne ŝtonojn »

Tagmeze Duncan Charters prelegis pri « Modernaj teknologioj por Esperanto-lernado » kie li rakontis pri evoluo de teĥnikaj medioj ekde la fonografo de Thomas Edison ĝis la plej moderna E-lernado. Je la unua posttagmeze ekis samtempe tri kursoj (Fotoj 2-4): kurso por komencantoj, gvidata de Carlos F. Hernández Loarca, kurso por komencintoj, gvidata de Daniel Moreno Martínez



Fotoj 2-4. Maldekstre: kurso por komencantoj, centre: kurso por komencintoj kaj dekstre kurso por instruistoj.

kaj kurso por instruistoj, gvidata de Duncan Charters kaj Martin Schäffer. La unua estis ĉefe por enkonduki Esperanton kaj montri la facilecon kaj regulecon de la lingvo al partoprenantoj, la dua estis ĉefe paroliga kurso.

Post la dua horo venis tempo por mallaciĝi kaj tagmanĝi. Kelkaj foriris kaj serĉis proksiman restoracion kaj aliaj preferis mendi manĝaĵon por satiĝi en kongresejo. Grava estis kunigi fortojn kaj emon por la restantaj programeroj de la kongreso.

Revenante al la kongresaj aktivecoj okazis kunsido kun la celo krei novan sekcion en Meksiko de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Duncan Charters, ties vic-prezidanto, kaj Martin Schäffer kunordigis ĝin. En ĝi estis elektita la estraro de la sekcio (Foto 5): Carlos Fernando



Foto 5. Duncan Charters kun la nova estraro de la meksika ILEI sekcio.

Hernández Loarca kiel sekci-estro, Manuel García Jurado Taracena kaj Gabriela Reyes Zárate kiel estraranoj.

Kelkajn minutojn poste, ĉirkaŭ je la 17a okazis du samtempaj prelegoj. Unu el tiuj, « Lerni Esperanton por lerni aliajn lingvojn; lerni aliajn lingvojn por lerni Esperanton », estis prezentata de Juan Mario Morales de la Torre, loĝanto de Meksikurbo kaj en la alia, Edgar Noel López Borja, membro de la LKK, prezentis la temon « Planado-oranizado de ĉeestantaj kursoj », en kiu li parolis pri siaj spertoj en la pretigado de kursoj kiel parto de la aktivecoj realigataj en la klubo Esperanto GDL.

Sekve ni okazigis la Ĝeneralan Asembleon de Meksika Esperanto Federacio. Dum ĝi la estraro de MEF komunikis al la membroj pri la laboro farita ne nur de la estraro sed ankaŭ de multaj membroj kaj esperantistoj en Meksiko dum la jaro 2010, substrekante la atingojn kaj antaŭenirojn en la diskonigado de Esperanto tiel kiel en la organizado de kursoj en diversaj lokoj de la lando kaj precipe en universitatoj kiel la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC), la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ) kaj la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM). Dum ĉi tiu aranĝo, aktivuloj de la urbo Querétaro petis la asembleon havi la eblon okazigi la venontan nacian kongreson en la urbo Querétaro. La asembleo unuanime akceptis la peton ĉefe ĉar estas montraj ke la grupo “Esperetaro” forte laboras kaj kapablos organizi bone la eventon.

Unu el la lastaj aktivecoj de la tago estis la partopreno de profesoro Charters, kiu prezentis diversajn prononcojn, kiujn oni povas trovi ene de la Esperanta komunumo. Sendube ĉi tiu estis amuziga maniero por malstreĉigi la lacegajn sed feliĉajn kongresanojn kaj tiel pretigi la nokttempon por festi la tujsekvantan meksikan feston. Dum ĝi la ĉeestantoj babilis, manĝis kaj profitis aŭskulti la



Foto 6. Dekstre kiel “Charro”: Edgar López, la “Escaramuza” estas Louisette Chacón, maldekstre troviĝas Ulises Franco, ĉiuj el la loka klubo.

aktoron Georgo Handzlik kun kiu ni kune kantis kelkajn kanzonojn en Esperanto. Kelkaj junuloj esperantistaj (Foto 6) aldonis al la nokta programo mallongan priskribon de vestaĵoj de la tipa meksika “charro” (ĉar-ro) kaj lia ino, la “escaramuza” (eskaramusa), kiuj devenas de la kongresurbo “Guadalajara”.

Sabate, je la 17a de septembro

La tago komenciĝis per du interesaj prelegoj de Sergio Eduardo Romero Aldana kaj Manuel García Jurado Taracena, kiuj parolis pri la temoj « Kreado de didaktika materialo por la instruado de Esperanto » kaj « Kiel faciligi (mem)lernadon de Esperanto? Propra sperto », respektive. Tiuj estis la du lastaj prelegoj de la kongreso, la resumon de ĉiuj vi povos trovi en la numero 1-2011 de “NI ĈIUJ”, kiu troviĝas en <http://www.esperanto-mexico.org/files/NICXIUJ-2011-1.pdf>

Pli malfrue la kongresanoj povis spekti ege interesan teatraĵon. Georgo Handzlik venis de la fora Pollando por prezenti al ni ĝin (Foto 7). Ĝi estis tiom bona, ke indus iri al Pollando por spekti



Foto 7. Prezento de "La vivo de Zamenhof"

tion denove. La temo de la monodramo estis "la vivo de Zamenhof". Nekredeble kiom sindediĉa estis la iniciatinto de Esperanto!

Post la teatraĵo okazis du diversaj labortabloj. Unu temis pri Esperanto-informado kaj la alia estis por Esperanto-instruistoj. La laborgrupon pri informado gvidis Martin Schäffer kaj tiu por Esperanto-instruistoj estis gvidata de Duncan Charters.

En la laborgrupo por informado (Foto 8) ni baze eksciis kial entute informi pri Esperanto kaj kiel plej taŭge fari tion. Tre amuza estis la intervjuoj por radio-stacio. Unu de la ĵurnalistoj estis ege malica kaj demandis tre stultajn kaj ĝenajn aferojn. Pli bonŝanca estis la alia intervjuito, kiun intervjuis bona kaj informita ĵurnalista. Esenco de ambaŭ intervjuoj tamen estis, ke oni devas bone prepari la aferon kaj ke oni devas laŭeble lasi bona impreson ĉe la aŭskultantoj. Oni sciis kiun mesaĝon oni volas transdoni kaj oni donu ŝancon al la aŭskultantoj retrovi la lingvon. Oni ankaŭ informu kie oni povu lerni ĝin.

En la labortablo por instruistoj (Foto 9) partoprenis ne nur aktivaj E-instruistoj sed ankaŭ homoj, kiuj iam instruis kaj volas refari la taskon kaj tiuj, kiuj celas estonte instrui la Internacian Lingvon. Tia labortablo komenciĝis per la memprezento de partoprenantoj, kiuj tiam aŭ dum la sesio kundividis kun la aliaj spertojn en la instruado de diversaj kursoj de Esperanto; por infanoj, plenkreskuloj, universitatoj, maljunuloj, retaj, ktp. Nia gvidanto parolis al ni pri siaj spertoj kiel instruisto de Esperanta kaj hispana lingvoj en universitata nivelo kaj rekomendis al ni uzi diversajn materialojn, strategiojn kaj metodojn laŭ ĉiu grupo. Ekz. kiel integri talentajn lingvajn gelernantojn kun tiuj, kiuj havas malfacilaĵojn aŭ ne tro da memfido. Ankaŭ diversaj lernomaterialoj estis montrataj kun la celo vekigi novajn ideojn en la partoprenantoj por krei utilajn instruilojn – lernilojn.



Fotoj 8 kaj 9. Supre: labortablo por aktivuloj.
Sube: labortablo por instruistoj.

Kiel antaŭlasta aktiveco de la tago estis grava renkontiĝo de Meksika Esperanto-Junularo (Foto 10). La 15-junuloj ĉeestantaj ŝanĝis la statuton de MEJ en kelkaj punktoj kaj oni elektis novan estraron. Prezidanto fariĝis Sergio Romero Aldana el Querétaro, aliaj estraranoj estas: David López

Rueda (San Luis Potosí), Ulises Franco Pérez, Edgar López Borja (Guadalajara) kaj Carlos Hernández L. (Querétaro). Tre vigla estraro, tre viglaj junuloj!



Foto 10. Junuloj post la MEJ kunveno.

Post tagmanĝo ni ne revenis kongresejen sed iris rekte al la “Casa de la Cultura Jalisciense”, por partopreni la atenditan “Kultura Vespero”. Kiel informite en la retpaĝo de MEF, en facebook kaj en diversaj listoj, ni havis la apogon de la registaro de la ŝtato de Jalisco por okazigi la eventon kaj informi tiele pri Esperanto al la ekstera publiko.

Nia konstanta kunlaboranto Guadalupe Vega Acosta alvenis pli frue al la kulturdomo kun la celo informi pri la evento al homoj, kiuj preterpasis kaj samtempe donis al ili flugfoliojn pri Esperanto. La plej multo de la spektantoj estis esperantoparolantoj, tamen ni ankaŭ havis la ĉeeston de ĝenerala publiko.

Daniel Moreno Martínez kaj Martin Schäffer prezentis la spektaklon, kiel artistoj partoprenis ĉefe talentaj esperantoparolantoj meksikaj kaj eksterlandaj sed ankaŭ koncertis homoj, kiuj apogas la movadon kaj kiuj, laŭ postkoncertaj komentoj, decidis eklerni la lingvon.

La unua koncertisto estis Gabriel Jiménez Rendón (Foto 11), kiu ludis pianon, sekve Armando Hernández Téllez kaj Ana Lilia Díaz López (Foto 12), tute profesie kaj bele ludis siajn fagotojn. Alvenis la vico de Leonardo Jáuregui Soto, kiu kantis por ni du konatajn kantojn, almenaŭ por meksikanoj, “*El triste*” kaj “*Con te partirò*” uzante mikse Esperanton, hispanan kaj italian.

Finfine aperis JoMo (Foto 13) kun sia karismo kaj karakteriza simpatio, la publiko tre ĝuis liajn kantojn, eble li sentis sin ne tute komforta uzante alies gitaron sed tio ne gravis tiam por iu. Malbonŝance lia gitaro rompiĝis dumvojaĝo, pro tio li devis uzi tiun de la loka grupo “Les Peatonés”, kiu ludis je la fino (Foto 14) ne nur en la hispana sed ili surprizis la spektantojn kiam ili prezentis kantojn en Esperanto. Je la vico de tiu ĉi lasta grupo, pluraj iris al la scenejo por kunludi kaj kunkanti. Partoprenis tiam junuloj el Querétaro, Chapingo, el la Ĉefurbo, kaj nia kara JoMo.



Foto 11. Gabriel Jiménez Rendón ludas pianon.



Foto 12. Ana Lilia Díaz kaj Armando Hernández ludante fagotojn.



Foto 13. JoMo slavumas, friponas kaj kantas.




Foto 14. Loka grupo "Les Peatonés" de Cultura del Estado de Jalisco" pro la grava kunlaboro.

Post tiu ĉi lasta aktiveco de la tago, kelkaj homoj profitis la tempon vespermanĝi kune kaj iri promeni en la urbocentro por ĝui la organizaĵojn de la registaro kadre de la sendependiĝa festo de Meksiko.

Je la fino ni faris komunan foton (Foto 15), ĉiuj restis tre kontentaj kun la rezulto de tiu ĉi spektaklo. Ni, la estraro, la organizantoj kaj ĝenerala publiko tre kore dankas la artistojn, kiuj kreis agrablan, belegan, amuzan, fratecan etoson. Ankaŭ ni tre kore dankas al "Stiftung Mondo" kaj al "Secretaría



Foto 15. Grupa foto post "Arta Vespero" en la Casa de la Cultura Jalisciense.

Dimanĉe, je la 18a de septembro

Je dimanĉo matene, la kongresanoj kuniĝis denove por fermi la 11an MEK. Fine en ĝi partoprenis 45 personoj el kvar landoj: Francio, Pollando, Usono kaj, kompreneble, Meksiko. Ni havis la ĉeeston de esperantoparolantoj el 14 meksikaj urboj: Chapingo, Ciudad Juárez, Distrito Federal, Guadalajara, Hermosillo, Monterrey, Oaxaca, Querétaro, San Luis Potosí, Saltillo, Tecamac, Texcoco, Tula kaj Zapopan. Kiel oni povis vidi en la fotoj, 2 trionoj de la partoprenantoj estis viroj, surprizite pli ol la duono de la kongresanoj troviĝas en la juna aĝo.

La ĝenerala temo de la kongreso "La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj" donis al ni la eblon atenti pri specifaj temoj rilataj al la instruado sed ankaŭ ni forte laboris en aliaj kampoj kiel la disvastigado, informado kaj utiligado de la lingvo.

La solena fermo (Foto 16) estis plena da dankoj, bondeziroj, gratuloj, novaj projektoj kaj



Foto 16. Je la fermo, reprezentanto de LKK de Guadalajara (dekstre), transdonis la flagon al LKK-ano de la venonta MEK.

esperoj, ni finis la okazaĵon je la 10a kaj 20 matene, kelkaj homoj tuj, aŭ eĉ antaŭe, reveturis hejmen, aliaj restis por fari la lastajn fotojn, vidi la libroservon kaj adiaŭi. Tiam kelkaj homoj ricevis donace, pere de MEF, librojn el Inĝ. Fidel Figueroa M., Fundación Esperanto kaj/aŭ el Eldona Societo Esperanto.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

Je postagmezo nur ankoraŭ restis eta grupo da personoj, kiuj atendis sian vicon por fari la parolan ekzamenon. Fine nia bela kongresejo restis tute malplena proksimume je la 2a posttagmeze.

Indas ankoraŭ danki denove al Leo Jáuregui pro, tute sindoneme, lasi al ni uzi “Cobeh In” kiel kongresejon, al niaj ĉiutagaj helpantoj: Carlos Acevedo Chávez, ĝenerala helpanto kaj kelnero, Isabel Mateos Santiago, zorganto de la libroservo, al ĉiu organizanto, speciale al grupo Esperanto GDL, kaj al ĉiu kongresano.

Nur restas al ni inviti ĉiujn partopreni en la venonta Meksika Esperanto Kongreso, kiu okazos en 2012 en la bela urbo Querétaro, atentu novaĵojn pri tio kaj klopodu ĉeesti, vivi persone la Esperantan etoson. ĜIS REVIDO EN QUERÉTARO!

